# Voĉo el Bona Espero

Fazenda-Escola Bona Espero
77260 Alto Paraiso, Goiás, Brazilo.

Aŭtuno 1976



## Karaj geamikoj de Bona Espero

Nia unua "voĉo" estis tre ŝatata de la legantoj, kiel atestas la multaj leteroj ricevitaj. Sekve, ni estas preskaŭ devigitaj aperigi duan numeron por ne atendigi tro longe niajn korespondantojn.


Cetere, la ek-de-februara plialtigo de la brazilaj poŝtaj tarifoj (ĉ. 60%), metis en krizon la delikatan buĝeton de Bona Espero. Fariĝis por ni tre malfacile respondi al ĉiuj per aparta letero, kies aerpoŝta afranko por Eŭropo kostas nun la ekvivalenton de 1,5 kg. da rizo. Do, la bonesperanoj troviĝas antaŭ la dilemo: ĉu kuiri supon aŭ forsendi leteron? La solvo estas la preteco de nia samideano Torben Kehlet helpi al ni per plua aperigo de nia bulteno.


## Intensa trafiko en la flughaveno de BE

Rakontas la lokaj historiistoj, ke la valo de BE estis unu el la kandidatoj kiel sidejo de la nova ĉefurbo kaj ke Brazilio ne situas ĉi tie nur pro manko de 2 voĉoj dum la sistema balotado ĉe la brazila senato. Nia bonŝanco dependis de la konsidero, ke ĉi tie ekzistas montoj, kiuj malhelpus la evoluon de granda metropolo, kiel estos Brazilio dum la venontaj jardekoj. Tamen, el tiu tempo, kiam oni esploris la regionon, restis flugkampo ĉ. 2 km. longa, apude al niaj domoj.

La 20an de februaro, alteriĝis sur tiu kampo du aviadiloj, kiuj kunportis el Brazilio ses usonajn vizitantojn. Temis pri nia amiko Jack Lesh, kiu post dumonata restado ĉe ni, veturis al Rio kaj de tie revenis kun siaj parencoj scivolaj pri BE. Post tri tagoj, la samaj aviadiloj revenis por reakompani la gastojn. Sed se la alteriĝo ĉe ni estas relative facila, la forflugo je plena ŝarĝo timigis la pilotojn, kiuj petis nin veturi ĝis Alto Paraiso, kie la flugkampo estas pli bonstata. Dum la forflugo, la pasaĝeroj fariĝis 8, ĉar aldoniĝis ges-roj Eliza Kehlet kaj Aŭgust Weide, kiuj revenis al la "civilizo" post trisemajna restado en BE. Kaj dum tiu eksterordinara aertrafiko abrupte skuis la silentan vivon de Alto Paraiso, la bonesperana tribo svingis la manojn kaj el kor' salutis "nur estas ĝis revido frat' "!

Intertempe, la potencaj traktoroj de nia samideano Nid, direktoro de la ŝosea departemento de Brazilio, purigis kaj ebenigis nian flugkampon, kiu nun aspektas belege kaj atendas vian alteriĝon.





Tio ĉi ne estas bildo de la nova mezgrada lernejo en Alto Paraiso, sed de la elementa lernejo en Bona Espero

## Radiaj kontaktoj

Atendante la alvenon de kompetenta radioamatoro kaj starigon de malgranda stacio, Bona Espero jam estas kunligita kun Alto Paraiso per malgranda aparato Sommerkamp, kiu elsendas sur frekvencoj de 144,600 kaj 145.300 KHz. Malgraŭ la modesta potenco, tiu aparato estas tre utila por urĝaj alvokoj kaj por informi niajn gelernantojn en la vilaĝo, ke ili ne atendu nin, kiam subita ŝtormo detruas unuel la pontoj!



Ĉar ankoraŭ ne estas elektro en Bona Espero oni instalis la novan radion en la aŭtomobilo de ges-roj Grattapaglia, kaj ĝi do uzas la elektron de la 12-volta baterio

## Nia mezgrada lernejo estas realaĵo

La 16an de februaro 1976a estis historia tago por Alto Paraiso, ĉar oni inaŭguris la unuan postelementan lernejon de la regiono vasta kiel Svislando, kiu situas norde de Brazilio. El 6 geinstruistoj, 4 estas bonesperanoj kaj danke al la esperantistoj oni faris pluan paŝon al plialtigo de la loka eduka nivelo. Ĝis nun la geknaboj de Alto Paraiso, kiuj deziris daŭrigi la lernadon postelementan, estis devigitaj elmigri ofte kun la tuta familio. Sekve la vilaĝo daŭre malriĉiĝis je plej taŭgaj kaj talentaj elementoj. Ne ekzistis ĝis nun mezgrada lernejo, ĉar neniu instruisto estis allogita de la salajroj, kiujn oni pagas ĉi tie. Sed la bonesperanoj estas nekuraceblaj idealistoj kaj, eĉ sen salajro, ili kreos en Alto Paraiso insulon de kulturo! Al la naivaj kamparanoj ni instruas la misterojn de supera matematiko; al la fortikaj bovgardistoj ni rakontas la historian apopeon de Brazilo, al la lokaj ĉarmulinoj ni malfermos novajn horizontojn kaj, precipe, al ĉiuj, blankaj, nigraj, laktokafaj, senrezerve kaj persiste, ni instruos Esperanton. Kaj se krome ili fariĝos veraj esperantistoj, tio estos la plej alta kompenso por nia laboro!

## Rapidaj respondoj

*S-ro R.Pal (Hungarujo):* Vi kaj via edzino estas kore bonvenaj ĉi tie. Brazila turisma vizo daŭras kutime 3 monatojn, sed dum tiu tempo estos praktike neeble perlabori en BE la reveturan koston. Al niaj kunlaborantaj gastoj ni povas garantii senpagan restadon, sed ili devos pagi la veturadon.

*F-ino A.Szabo (Hungarujo):* La limigita skribokapablo de la infanoj de BE ne ebligas ampleksan korespondadon. Ili tamen ĝojas ricevante leterojn el eksterlando. Vi ricevos de tempo al tempo novaĵojn pere de nia bulteno.

*S-ro T.Ilow (Aŭstralio):* Via letero de okt. 75 restis ĝis nun sen respondo, ĉar ankoraŭ ni ne trovis por vi "grasan" korespondantinon, laŭ via peto. La dieto en BE estas tiel ekvilibrita kaj la laboro tiel peza, ke neniu grasiĝas. Ĉar vojaĝadi estas unu el viaj hobioj, venu viziti nin por mem elekti.

*F-ino P.Bascou (Francujo):* Ni esperas, ke tiu ĉi bulteno, almenaŭ parte, respondas al viaj demandoj.

## Malgranda bilanco kaj novaj planoj

Kiu subtenas iniciatojn kiel la nian ŝatas scii kiel oni uzis la ricevitajn mondonacojn. Sekve, kune kun la nomoj de la personoj, kiuj ek de la monato septembro '75 helpis al ni, vi trovos ĉi tie mallongan raporton pri la utiligo de tiuj sumoj:

El *Germanujo*: R. Fisher, 50 DM; H. Behrmann, 100 DM; E-Grupo Münster, 100 DM; E-Grupo Bremen, 140 DM; A.Mosch 250 Kruzejzejroj; B.Vogelmann, 500 DM; K.Link 2600 Kruz.; G. Peek 775 Kruz.; H.Bellen 102 Kruz.; O.Sandkühler 330 Kruz.; E-Grupo Schwelm 40 Dolaroj; Ges-roj Schindler 20 Dol.; E.Blasius 2000 Kruz.

El *Italujo:* E-Grupo Torino 39000 liroj; A.Ferrari 335 Kruz.; M.Bauchiero, 20000 Lir.; G.De Castelli 175 Kruz.; A.Belloli 200 Kruz.

El *Danlando:* T. Kehlet 8000 Kruz.

El *Francujo:* S-ino Gabriel 20 Dolaroj.

El *Britujo:* I.Nassif 87 Kruz.

El *Luksemburgio:* E.Pleim 516 Kruz.

El *Nederlando:* R.Dittlof 30 Gld. Ges-roj Goldenbelt, 75 Gld.

El *Usono:* Familio Gerber 450 Kruz.; familio Lesh 3000 Kruz.

El *Argentinio:* J. Scolnik 500 Kruz.

El *Aŭstralio:* T.Einihovici 400 Kruz.; A.Spencer 600 Kruz.


El *Brazilo:* E.Nascimento 1000 Kruz.; G.Soeira 1216 Kruz.; M.Garofalo 830 Kruz.; Almir P.da Silva 1000 Kruz.; F.Scartezini 874 Kruz.; Frederico H. de Melo 100 Kruz.; Budine P. de Souza 200 Kruz.; Mauro G. de Azevedo 460 Kruz.; Dionisio Carlos 100 Kruz.

Krome, la Eŭropa E-Kongreso sendis al ni 710 Gld; sendis pakaĵojn el Germanujo: R.Eigendorf, E.Blasius, Ges-roj Schindler, la E-Grupo Heilbronn kaj grupo de gelernantoj el Schwelm. En Münster fondiĝis amika rondo "por la prospero de Bona Espero".

*AL ĈIUJ PLEJ KORAN DANKON!*

Entute ni ricevis ĝis la fino de julio '76, ĉ. 34.000 Kruzejrojn t.e. la ekvivalenton de ĉ. 3.400 usonaj dolaroj. Ĉar ofte okazis prokrastoj kaj malfacilaĵoj en la ricevado de tiuj sumoj el eksterlando, ni petas niajn geamikojn sendi eventualajn mondonacojn rekte sur nian konton ĉe UEA ; Nieuwe Binnenweg 176, NL-3002 Rotterdam. Ni havas ankaŭ kônton en Brazilo: "Bona Espero - Conta nº 34.300-30 do Banco Francês e Italiano para a America do Sul – SUDAMERIS – Agencia Brasilia"

Per via helpo ni renovigis la vestaron de niaj infanoj kaj aĉetis novajn matracojn. Krome ni aĉetis kaj transportis konstruan materialon por iom post iom fini niajn domojn (cemento, kalko, tegoloj, pordoj, fenestroj, kaheloj, k.t.p.) Niaj prioritataj planoj ĝis la fino de la seka sezono antaŭvidas la riparon de la tegmento de nia lernejo kaj plibonigon de niaj paŝtejoj per plugado kaj semado de nova greso. Unu el niaj ambiciaj planoj estas ankaŭ krei en Bona Espero grandan Esperanto-bibliotekon kaj tiucele ni jam estas ordigantaj la ekzistantan materialon.



Interalie oni blankigis la domojn kaj enmetis novajn fenestrojn. Jen f-ino Sally metante mastikon ĉirkaŭ la vitrojn.

## Monteto Zamenhof

Al la serio de stratoj, placoj kaj ĝardenoj dediĉitaj al la aŭtoro de Esperanto, aldoniĝis nun monteto, kiu staras ĉe la limo de Bona Espero en bela pozicio.

Sur la pinto de tiu monteto oni baldaŭ inaŭguros buston de Zamenhof, ricevitan dum la Esperanto-Seminario en Brazilio. Ne estis fakte eble starigi tiun buston en la ĉefurbo (kie ne ekzistas monumentoj al personoj), kaj la Kultura Kooperativo de Esperantistoj en Rio donacis la buston al Bona Espero, kiu siavice disponigis la monteton. Ĝi kompreneble estas tute verda, por respekti la tradicion.

Jen f-ino Sally kaj alia bonesperano s-ro Gerolino





Dum la diservo de la XI-a Seminario de Esperanto en Brazilio oni predikis en Esperanto. Jen rigardo de supre pri parto de la ĉeestantaro. Granda estis la travivaĵo aŭdi nian genian lingvon en la genia kreaĵo arkitektura de Niemeyer - la katedralo de Brazilio.

## Eksterlandaj vizitantoj

Dum la lasta jaro, entute 20 eksterlandanoj vizitis Bonan Esperon kaj, precipe post la Esperanto-Seminario, okazinta en julio en Brazilio, la etoso ĉe ni estis vere internacia, kun reprezentantoj el sep diversaj landoj. Ĉiuj atingis Bonan Esperon per pli malpli aventura vojaĝo, sed la rekordo tiurilate apartenas al Sally Brabenec. Ŝi flugis de Londono al Novjorko kaj de tie ŝi petvojaĝis ĝis Brazilio. La veturado daŭris kelkajn monatojn kaj ŝi ofte riskis perdiĝi en tiu ĉi vasta kontinento. Tamen ŝi bonorde alvenis kaj nun multe helpas al ni. Nura problemo: ŝi ne posedas restadpermeson en Brazilo kaj ĉiun trian monaton oni devas trovi la manieron plilongigi ŝian vizon. La plej simpla solvo estas foriri de la lando unu tagon por akiri la rajton reveni dum tri monatoj. Nura ĝeno estas la fakto, ke la plej apuda landlimo situas je 1100 km de BE en rekta linio.

Sed por Sally tio ne estas problemo, ĉar ŝi ja petvojaĝas!

Kaj atendante iam vin ankaŭ en Bona Espero, plej kore salutas

*la BONESPERANOJ*

